

07

The American Esperanto Journal

OFFICIAL MAGAZINE OF THE
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

ESPERANTO

AUXILIARY



LANGUAGE

INTERNATIONAL

Copyrighted, 1907, by the American Esperanto Association

Vol. I

AUGUST, 1907

No. 8

The American Esperanto Association

(Founded 1905.)

Honorary President—Dr. L. Zamenhof.

President—Prof. G. B. Viles, Ohio State University.

Treasurer—Stephen W. Travis, Jr. *Secretary*—John Fogg Twombly.

Publication Office of the American Esperanto Journal is at 34 Green St., Brookline, Boston Postal District, Mass., U. S. A.

The American Esperanto Association exists for the following purposes:

- 1) To furnish information about Esperanto.
- 2) To provide students with proper books.
- 3) To provide certificates of proficiency in the language. Specimen examination papers sent for 10 cents.
- 4) To publish the American Esperanto Journal.
- 5) To unite with one another individual Esperantists and, especially, the Local Esperanto Societies.

Membership in the Association, including a year's subscription to the American Esperanto Journal, \$1.50. Send all membership dues to the Secretary, Am. Esperanto Ass'n, Boulevard Station, Boston, Mass.

AFFILIATED ORGANIZATIONS:

Help us and help yourselves by becoming affiliated with the American Esperanto Association. This will cost you only \$2.00. You will receive a year's subscription to the American Esperanto Journal, the name of your society and the name and address of your Corresponding Officer will appear regularly on the cover of the Journal. Send the necessary information and money to the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass.

Massachusetts Agri. College Esperanto Club, E. Victor Bennett, 25 No. College, Amherst, Mass.
Boston Esperanto Society, Edw. K. Harvey, Perkins Institution, South Boston, Mass.
Esperantaj Pioneroj, Aaron D. Wolpe, Perkins Institution for Blind, South Boston, Mass.
Brooklyn Esperanto Society, Durbin Van Vleck, 148 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
Cantibrigia Esperanto Group, Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
Harvard Esperanto Society, H. R. Shipherd, 69 Dana St., Cambridge, Mass.
Esperanto Club of Chicago, C. E. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago, Ill.
Leibniz Esperanto Club, Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
Univ. of Chicago Esperanto Society, Floyd B. Hardin, Middle Div. Hall No. 37, Chicago, Ill.
Esperanto Club of Ohio State Univ., Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.
Elgin Esperanto Group, Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.
Everett Esperanto Club, Mrs. F. F. Driscoll, 161 Cottage St., Everett, Mass.
Esperanto Society of Los Angeles, Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
Kansas State Agri. College Esperanto Club, Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.
New Britain Esperanto Club, Rolland B. Moore, P. O. Box 700, New Britain, Conn.
New York Esperanto Society, Stephen W. Travis, Jr., Lock Box 8, Tenafly, N. J.
Jamestown Esperanto Club, Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
First Nebraska Esperanto Club, Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.
Emory Esperanto Club, Jack Dempsey, Emory College, Oxford, Ga.
Philadelphia Esperanto Society, Lewis B. Lueders, 206 S. 41st St., Philadelphia, Pa.
San Diego Esperanto Society, C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.
Searchlight Esperanto Club, Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.
Seattle Esperanto Society, Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.
St. Louis Esperanto Club, Mrs. Meade C. Dobson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.
Winona Esperanto Club, Rev. J. J. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.
Worcester Esperanto Society, Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
Portland Esperanto Society, Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.
Esperanto Club of Rockford, Chas. Froeding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.
Columbus Esperanto Society, M. Janet Rogers, 403 Luckhaupt Ave., Columbus, Ohio.
L'Espere Esperanto Club, Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Maine.
Auburn Esperanto Society, Clarence F. Welch, Sec., Recorder's Office, Auburn, N. Y.
Good Templars Esperanto Club, Harry C. Welsh, Sec., care of M. M. Co., Missoula, Mont.

The American Esperanto Journal

Vol. I.

AUGUST, 1907

No. 8

THE American Esperanto Journal is published by the American Esperanto Association. It is the official organ of the Association, and also of the local Esperanto societies in Boston, Chicago, New York, Philadelphia, Los Angeles, Seattle, etc. It is issued monthly by the Association and will aim to be especially useful to beginners.

All writers to the Journal must observe the following rules:

1. Write legibly or, preferably, "type-write."
2. Use paper as large as that of the Journal.
3. Write only on one side of the sheet.
4. Leave large spaces between the lines.

The Editors reserve the right to correct and to reject all manuscripts. No manuscripts will be returned except in the case of articles rejected, and only then, when such articles exceed 500 words in length, and are accompanied by return postage.

The American Esperanto Journal is a "propaganda organ." The editors and other workers on it give freely of their time and labor; writers of articles must do likewise.

Address articles to the REDAKTORO, AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Boulevard Station, Boston, Mass. News articles should be addressed to the REDAKTORO DE KRONIKO.

AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

One subscription with membership in the American Esperanto Association.....\$1.50
Journal alone, subscription price..... 1.00

Send all subscriptions to the *Secretary, American Esperanto Association*, Boulevard Station, Boston, Mass. Change of address costs 10 cents; no changes made during the summer months; your postmaster will forward your Journal during the summer for a few cents. Please address all complaints to the Secretary. The Journal does not regularly appear until the middle of the month; in July, August, September and October, not until the end of the month. For advertising rates address Stephen W. Travis, Jr., Business Manager, Tenafly, N. J.

The American Esperanto Association exists for the purpose of promoting the cause of Esperanto. It is not a commercial organization. The officers of the Association, the editors of the Journal, and the writers of articles for the Journal, give freely of their time and strength for the "cause." Friends put their hands into their pockets to make up the deficits which hitherto have been a constant feature of the propaganda.

The postage and stationery account amounts to about \$25.00 a month. Salaries for clerical work cost at least \$40.00 a month: about 15,000 letters and postal cards were answered last year. All this costs money. The Journal may pay for itself this year; but it brings no surplus into the treasury. There remains only profits from the sale of books. These have been gradually increasing during the past few months, but they probably will not amount to enough during the present year to balance the expenses.

Booksellers are importing their own Esperanto books. Some firms have even become wholesale dealers in these to a limited extent. All this helps the Esperanto "cause," and we

rejoice in it; but our readers must bear in mind that it may not help the Association financially at all. Nevertheless, we desire that the book-trade itself shall take up vigorously the sale of Esperanto books on their own account; we wish that several large firms should become centers for the sale of all sorts of trustworthy Esperanto works.

Our readers and customers will therefore bear in mind in the future these facts. They will try their best to lighten our labors, rather than to increase them. For instance, when you change your address, send 10 cents for the printing of the new address. And when you write articles for the Journal, *write them with a typewriter, or get them typewritten*. We have to put them in that form for the printer. Save us the trouble and expense of so doing. Moreover, your work is not so likely to be thrown into the waste-basket.

Finally, remember that there are standard works of reference: Bullen's Lessons, Cox's Grammar, Motteau's Esperanto-English Dictionary, etc. *Consult these before asking us questions.*

Esperanto ne estas perfekta; tion ni ĉiam konfesis kaj konfesos. Sed ĝi estas hodiaŭ uzbla por ĉiaj celoj, ĝi estas neŭtrala kaj kontentige facile lernebla. Efektive ĝi havas makulojn, malfortaĵojn,—almenaŭ laŭ mia opinio kaj kompreneble laŭ la via,—sed kiel forigi praktike tiujn ĉi makulojn kaj malfortaĵojn? Eble tion kion vi kondamnas, mi kontraŭe trovas bona. Kion la Angloj laŭdas, tion la Rusoj malŝatas.

Ĉu ni proponos al kongreso ke ĝi balotos pri la plibonigoj? Post pripensado dum nur momento ĉiu prudenta homo devos kompreni ke neniu amaso da homoj,—ĉar ĉiu kongreso necese estas tia,—povas rajte decidi tiujn demandojn. Ĉu ni akceptos la decidojn de komitato elektota de Dro. Zamenhof mem el la plej lertaj Esperantistoj? Tio estus pli bona projekto, sed tia komitato kompreneble farus malmulte da ŝanĝoj. Kial ne? Pliparte ĉar ĝiaj anoj efektive jam de longe pripensadis la ŝanĝojn proponitajn, jam ekzamenis ilin de ĉiu flanko, kaj decidus kontraŭ ili.

Tiel farante ili pli parte farus bone; ĉar la pli parto da la "reformoj" proponitaj ne estas plibonigoj sed kontraŭe plimalbonigoj. Aliaj aferoj estas tute indiferentaj; eĉ se oni povus facile ŝanĝi ilin, oni ne ricevus grandan profiton. Ekzemple, la afero pri supersignitaj literoj nun kaŭzas nur iom da malfacileco: oni povas nun facile ricevi ilin en ĉiuj landoj. Kiam tio ne estas ebla, oni povas rajte uzi la

"h" anstataŭ la supersigno. Tiu ĉi prezentas solvon praktikan kaj de longe uzita. Kial do klopodi multe pri ĝi? Plie, la akusativa "n," kiu ŝajnas al kelkaj personoj teruraĵo, estas efektive helpilo, klarigilo. Ĉiu persono komprenanta la diferencon inter "mi vidas lin" kaj "li vidas min" jam venkis praktike la malfacilaĵojn.

Tamen la unueco estas multe pli grava por nia afero ol iu ajn "plibonigo." Ni devas unuigi niajn fortojn: ne elkonsumu ilin en preskaŭ senutilaj diskutoj. Nun estas la oportuna tempo por la propagando ekstera, ne por la disputado interna.

Pli bone estus por ni ĉiuj ellerni nian lingvon, akiri efektivan lertecon en la praktika ĉiutaga uzo de ĝi. Antaŭ ol kritiki, unue provu ĉu ekzistas efektive en la lingvo multon kritikeblan. Ni zorgu ke niaj antaŭjuĝoj personaj aŭ naciaj ne erarigu nin. Antaŭ ĉio ni penu esti internaciuloj kiam ni uzas internacian lingvon. Skribu internacie, pensu logike, ne traduku laŭvorte. La angla lingvo ne estas internacia en sia sintakso. Tial penu akiri la veran internacian stilon: legu zorge la Krestomation, traduku elĉerpitaĵojn el ĝi, retraduku tiujn ĉi en Esperanton, studadu la Esperanto-Anglan vortaron, lernu parkere poemojn kaj prozaĵojn.

Denove legu la artikolon en la maja numero nomita "Skribu internacie." Malfrua numero de la Belga Sonorilo multe aprobis ĝin.

KRONIKETO

On Thursday afternoon, June 6th, Mrs. Winifred Sackville Stoner, of Evansville, gave a lecture on Esperanto, illustrated with charts and songs, at Henderson, Kentucky. Mrs. Stoner gained a number of converts for the new language and an Esperanto Club was organized. The Indiana Esperanto State Association, of which Mrs. Stoner is President, now boasts of 500 members who are doing all in their power to help the infant tongue on its sure march to victory.—(From the "Evansville Courier.")

The members of the Chestnut St. School Esperanto Club, the "Juna Espero" Club of Evansville, Ind., gave a very successful play in that language. The play "Regina Esperanto" was written by Mrs. Stoner, who, together with her little daughter, took parts in the play. Little Miss Stoner, only four years old, talked and recited in Esperanto very readily, and a feature of the occasion was the sweet singing by

Miss Lillian Ellerbush of some familiar songs translated into Esperanto. This enterprising children's club has already affiliated with the A. E. A.

Still another club was formed in Evansville lately, and it has promptly affiliated. It is called the "Non Nobis Solum" and has for its motto: "Ni laboru kaj esperu por Esperanto." The secretary is Miss Sadie Rucker, 1205 Chandler Ave., Evansville, Ind.

A number of members of the Navy Department at Washington, D. C., have united to study Esperanto. They are called the Washington Esperanto Society and the regular meetings take place in the large Lecture Hall of the Public library. There are at present five distinct groups for study in the Society. The Society has affiliated with the A. E. A. Mr. Charles W. Stewart, 1211 Kenyon St., N. W., is secretary.

(See page 6.)

DOKTORO EDMOND HALLEY

(1656-1742.)

The predicted return of the famous comet of Halley, during 1910, ought to make very interesting the career of the illustrious astronomer whose name is carried by that celestial object. Born in England, he was not an Englishman, for, like every eminent scientist, he belonged to the whole civilized world. Rightly said Professor Grant, in his "History of Physical Astronomy":—

"Posterity has retained a grateful recollection of those princes who at different periods of history, have distinguished their reigns by a munificent patronage of learning and science; but among all those who have thus contributed indirectly to the progress of knowledge, there is none who exhibits such a bright example of disinterestedness and self-sacrificing zeal as the illustrious superintendent of the first edition of the '*Principia*.'"

Some authors say that the most important and valuable act of Halley was his publication of the "*Principia*," the world-famous work of Sir Isaac Newton, at a time when the Royal Society of London did not possess sufficient funds. Halley himself was not rich then, but he bravely had that wonderful book printed which surprised all scientists and which to-day equally surprises them.

Halley, however, made many important discoveries, sufficient to merit forever the sincerest respect of the learned world. At the same time, although his studies were so profound, he possessed a very gay spirit and a character so lovable that he found many friends everywhere. His fame spread even to St. Petersburg, and when the Czar Peter the Great visited London, in 1696, he caused Halley to be summoned before him, conversed seriously with him concerning many affairs, and invited him familiarly to his table.

Halley traveled much, both on land and sea, and always returned to his fatherland bringing new riches for science, as has been said by Monsieur Mairan, the author of the excellent eulogy of Halley, which he read before the Royal Academy of Sciences, in Paris, in 1742; a eulogy which ought to be understood internationally and which, therefore, ought to be translated internationally, for all.

La antaŭdirita reveno de la famega kometo de Halleyo, dum 1910a, devas igi tre interesa la vivadon de la glora astronomiisto kies nomo portadas tiu ĉiela objekto. Naskiĝite en Anglujo, li ne estis Anglo, ĉar, tiamaniere kiel ĉiu eminenta scienculo, li apartenis al la tutmondo civilizita. Rajte diris Profesoro Grant, en sia "Historio de la Astronomio Fizika":—

"La posteularo tenadas dankeman memoron de tiuj princoj kiuj, je diversaj periodoj de historio, estas distingigintaj siajn regnojn per malavara protekto de lernado kaj scienco; sed inter ĉiuj kiuj estas tiel kontribuiciintaj nerekte al la progresado de sciado, neniu sin trovis kiu elmontris tian belan ekzemplon de malprofitemeco kaj sindonema fervoro kiel la faminda redaktoro de la unua eldono de la '*Principia*.'"

Kelkaj aŭtoroj diras ke la plej grava kaj valora ago de Halleyo estis lia publikigo de la "*Principia*," tutmonde famega verko de Sir Isaac Newton, je tempo kiam la Reĝa Societo de Londono ne posedis sufiĉe da mono. Halleyo mem tiam ne estis riĉa, sed li multmeme presigis tiun mirindan libron, kiu surprizis ĉiujn sciencistojn, kaj kiu hodiaŭ egale surprizas ilin.

Halleyo, tamen, faris multe da eltrovoj gravaj, sufiĉe por meriti ĉiam la plej sinceran respekton de la klera mondo. Samtempe, kvankam liaj studoj estis tiel profundaj, li posedis spiriton tre gajan, kaj karakteron tiel amindan ke li ĉie trovis multe da amikoj. Lia famo disigis eĉ ĝis Sankta-Peterburgo, kaj kiam la Caro Petero la Granda, vizitis Londonon, dum 1696a, li al si alvokigis Halleyon, interparolis serioze kun li pri multaj aferoj, kaj invitis lin familie kunmanĝi.

Halleyo multe vojaĝadis sur lando, sur maro, kaj ĉiam revenis en sian patrujon, alportante tien novajn riĉaĵojn por scienco, kiel diris Sinjoro Mairan, la aŭtoro de la belega laŭdego de Halleyo kiun li legis antaŭ la Akademio Reĝa de la Sciencoj, en Parizo, en 1742a; laŭdego kiu devas esti komprenata internacie, kaj kiu tial devas esti tradukata internacie por ĉiuj.

Eugene F. McPike, Esp. No. 14,975.
Chicago, Illinois, U. S. A.

ELPAROLAJ DISKUTOJ

Dr. MAX TALMEY.

Estas tre ĝojiga signo, ke fine en la lastaj monatoj eminentaj Esperantistoj montris la kuraĝon preparoli publike elparolajn demandojn kaj ĉesis lasi la elmontron de ekzistantaj diferencoj de elparolo al niaj kontraŭuloj. Sinjoro Ĉefeĉ skribis verketon pri la elparolo; Dro. Mybs pritraktis la elparolon en la Dresden'a kongreso de tiu ĉi monato (Majo); Sinjoro de Beaufront publikigis artikolon en L'Esperantiste de la lasta Aprilo pri la elparolo de e kaj o. Antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ la aŭtoritatoj esperantaj eĉ ne volis aŭskulti elparolajn diskutojn, timante malutili al la Esperantismo, se ili konfesus neigeblan kaj nekaŝeblan fakton. La malapero de tiu ĉi timo pruvas la ekfortiĝon de Esperanto. La batalantoj por absolute unuforma elparolo, se tia entute estas ebla, povas ĝui la plezuron, ke iliaj ideoj fine trovas rekonon kaj konsideron.

Antaŭ ol komenci la diskuton de la diferencoj de elparolo estas necese akcentegi, ke ĝi havas nur akademian aŭ teorian valoron, sed ne praktikan; ĉar praktike oni povas tute trankvile malzorgi la diferencojn tial, ke ili estas tiel malgrandaj, ke ili ne malhelpas la buŝan interkompreniĝon eĉ en la plej malgranda mezuro. Tion ĉi plene pruvis la du internaciaj kongresoj. Tamen neniu povas nei, ke estus tre dezirinde forigi la diferencojn, se tio ĉi estus ebla.

Ni provu nun montri kelkajn diferencojn. La c esperanta laŭ multaj lernolibroj estas elparole egaligata je t kaj s elparolitaj unu post la alia (vidu Pract. and Theor. Esper. § 3 a). Sed la Germanaj lernolibroj egaligas ĝin je la Germana z. Estas diferenco inter tiu ĉi kaj ts; ambaŭ sonoj estas tre similaj, sed ne absolute identaj. Se la z Germana ne estus elparolebla por kelkaj gravaj nacioj, ni devas akcepti por c la sonojn ts, kaj la Germanaj lernolibroj devas korekti sian instruon. Sed la elparolo de c precize kiel z Germana estus pli akceptebla pro tio, ke unu litera signo laŭ la principo de fonetiko devas reprezenti nur unu sonon. Ni ne plenumos tiun ĉi principon egaligante c al du sonoj t kaj s. Sed eble absoluta fonetiko estas neatingebla, kaj ni devas esti kontentaj.

Koncerne la vokalojn estas absolute necese por elparola diskuto disigi severe du ecojn. 1) La kvaliton, kiu estas la buŝformo necesa por la elparolo de la vokalo, kaj 2) la kvanton, kiu

estas la daŭro de la elparolo de la vokalo (vidu Pract. and Theor. Esp., p. 7an). La kvanto povas esti longa, meza, kaj mallonga. Kvalito kaj kvanto estas nepre nedependaj unu de la alia; vokalo de ia ajn kvalito povas ricevi ian ajn kvanton kaj kontraŭe. Ni petas niajn legantojn ne intermiksi tiujn ĉi du ecojn kaj ĉiam memori, ke tio, kion ni diras pri vokaloj, koncernas nur la kvaliton. Pri la kvanto ni ne bezonas malŝpari multajn vortojn. Ĝi estas ĉiam kaj ĉie meza en Esperanto (vidu § 4an).

Ekzistas diferenco en la elparolo de e esperanta. Oni povas distingi tri kvalitojn por tiu ĉi: 1) la fermitan, 2) la nefermitan, kaj 3) malfermitan (konsideru la tri germanajn vortojn "gebet," "Gebet," "gübet"). La e fermita (= a angla en "make") estas en multaj okazoj nenatura eĉ al tiuj nacioj, kiuj akceptis ĝin plene, kaj, kiel skribis al mi granda franca aŭtoritato, estas ŝanĝata nekonscie en la e nefermitan (= e angla en "set"). Tio ĉi fariĝas en vortoj kiel: perfekta, kelka, perdi, escepti, inter, diversi, fermi, lerni, cerbo, rekta, k. t. p. Tiu ĉi nenatureco de la e fermita en multaj okazoj estas la kaŭzo, kial kelkaj aŭtoroj instruas, ke e esperanta egalas la e anglan en la vorto "set" (vidu § 4an). Ĉar ili ne juĝas logike doni al la sama vokala signo du elparolojn, jen konscie la fermitan, jen nekonscie la nefermitan.

La plej granda diferenco ekzistas en la elparolo de la vokalkombinoj aŭ kaj eŭ. Estas du metodoj tie ĉi. Laŭ 1) la franca metodo oni devas aŭdigi a (e) kaj u unu post la alia, farante la u tre mallonga kaj ankaŭ la intertempo, t. e. oni devas aŭdigi du sonojn. Kontraŭe eĉ 2) la germana metodo oni elparolas la vokalkombinojn kiel unu sonon, kiel la samajn vokalkombinojn germanajn en la vortoj "glauben," "treu" (J. Borel). La plejmulto da Anglaj aŭtoroj sekvas eĉ "aŭ" la germanan metodon, sed eĉ "eŭ" la francan (vidu Pract. and Theor. Esp. § 5).

Antaŭ ol diskuti ambaŭ metodojn estas necese doni **logikan** difinon de unu silabo. Unu silabo estas elparolebla literkombino enhavanta nur unu vokalon sonon, t. e. vokalan sonon, kiu restas la sama dum la tuta daŭro de la elparolo; oni devas povi ekz. kanti la vokalan sonon de unu silabo daŭre kalkaj sekundoj, kaj la vokala sono ne devas esti ŝanĝata de la voĉekpuŝo ĝis la fino de la vokalelparolo. Aŭ mallonge: unu

silabo = unu vokala sono. Nu, ĉiu interkonsentas, ke aŭ, eŭ, devas esti unu silabo. Laŭ la franca metodo ili logike formas du silabojn, ĉar oni elparolas du vokalajn sonojn. Tial ni falas en la absurdon nomi du silabojn unu silabo. Ke tio ĉi aŭ io simila fariĝas en naturaj lingvoj, ne senkulpigas nin. Ĉar al tiuj ĉi lingvoj neloĝikecoj estas permesitaj. Al ili estus permesite konsideri kiel unu silabo eĉ cent vokalajn sonojn elparolatajn unu post la alia. Laŭ la germana metodo, "aŭ" estas elparolata kiel unu sono kaj tial formas logike unu silabon. Se estas gravaj nacioj, kiuj ne povas aŭ ne volas proprigi la germanan metodon, kaj ni ne volas akcepti ian trian metodon, ni akceptu la francan kaj ĉesu nomi aŭ, eŭ, unu silabo. Tio ĉi devigus nin ŝanĝi la akcentojn de multegaj vortoj kaj krom tio akcepti abomenajn malbelsonecojn. Konsideru la vortojn hodiaŭa, kontraŭulo, antaŭaŭtuna, k. t. p. (tri aŭ kvar vokaloj elparolataj unu post la alia, kia malbelsoneco!) Ke nia majstro uzas la germanan metodon, kaj kial li unufoje respondis al demando pri aŭ, eŭ, ke oni devas aŭdigi du sonojn a, e, kaj u, klariĝas per tio, kion Sro. J. Borel skribis al mi: "Tre ofte mi parolis kun nia majstro, sed mi povas diri al vi, ke li elparolas "aŭ" kaj "eŭ" tute same kiel mi (t. e. kiel en "glaube," "Europa"). Certe estas ke aŭ, eŭ, formas unu solan silabon, sed por la popoloj (ekz. la Francoj) kiuj ne havas la sonojn aŭ, eŭ, estas malfacile klarigi al ili kaj oni devas diri, ke estas elparolado kiel rapida sinsekva eldiro de la sonoj a kaj ŭ, e kaj ŭ."

Por eviti la absurdecon nomi du silabojn unu silabo kelkaj diras, ke ŭ estas konsonanto. Tute bone! sed la malfacilaĵo estas, ke neniu scias la elparolon de tiu ĉi stranga konsonanto. Se la elparolo estas tiu de u mallonga (mallongega), ŭ restas vokalo kaj ne fariĝas konsonanto. Se ili volas, ke ŭ egaligu je la w angla, ili enkondukas konsonanton neelparoleblan por ĉiuj

nacioj escepte la Anglojn, kio ne estas permesita en lingvo internacia.

Ili egaligas tiun ĉi strangan konsonanton je sono, kiun oni renkontas en hispanaj, italaj, kaj germanaj vortoj precipe post q kaj g (ekz. igual, Equatore, Quelle), kaj kiu estas elparolata jen grandparte kiel la vokalo u, jen kiel la konsonanto v. Sed ili forgesas, ke tiu ĉi sono okazas nur post konsonanto, ne post vokalo kiel la ŭ esperanta, kaj ke kelka sono elparolebla post konsonanto ne estas elparolebla post vokalo. Sekvante la ekzemplojn de la diritaj lingvoj kaj de aliaj, ni devus elparoli aŭ, eŭ, ĉu kiel a-u, e-u, ĉu kiel av, ev. En la unua okazo ŭ estas vokalo, kaj ni havas logike du silabojn, en la dua okazo ni devus uzi av, ev anstataŭ aŭ, eŭ, alimaniere ni enkondukus alian nefonetikaĵon en nian artefaritan lingvon. La esprimo "duonvokalo" ("duonkonsonanto") estas anomalio taŭganta nur por naturaj lingvoj, kiuj povas malzorgi la fonetikon. Artefarita lingvo ne devas enteni "duonvokalojn." Tiaj sonoj estas nur malklaraj, tute ne aŭ nur malfacile distingeblaj por la aŭdo. La voĉo glitas, por tiel diri, trans ili, ne akceptante ian difinan karakteron. Tiaj sonoj ne devas ekzisti en artefarita internacia lingvo, kiu devas enhavi nur malkonfuzajn bone karakterizitajn vokalojn kaj konsonantojn facile kaj klare elparoleblajn por ĉiuj nacioj.

Ankoraŭ unu fojon mi memorigas, ke ĉiuj tiuj ĉi diskutoj havas nur teoriantan valoron. Tamen ilia publikigo forprenos de niaj kontraŭuloj kontraŭdirojn ŝajne rajtigitajn. Ili eble alportos interkonsenton kaj unuformecon de la elparolo; kaj fine, se ili pruvos ke tiu ĉi unuformeco estas absolute neeble pro tio, ke la lingvaj organoj de diferencaj nacioj estas diferencaj, la elparolaj diskutoj rekondukos la neeviteblajn diferencojn al la plej malgranda mezuro.

Rimarko de la Redaktoro.

La Fundamento de Esperanto, akceptita de ĉiuj Esperantistoj, ordonas en sia germana parto, ke oni devu elparoli ŭ kiel "kurzes u" (short German u); en sia franca parto, kiel "ou bref dans l'allemand laut" (like u short as in the German "laut"). Tial, laŭ Dro. Zamenhof mem, la ŭ Esperanta, ĉu en aŭ, ĉu en eŭ, havas ĉiam la saman sonon,—tiun trovitan en la germana vorto "laut," kiu sono estas preskaŭ la sama trovata en la angla vorto "loud."

La eŭ germana ne saĝnas taŭgi por la eŭ Esperanta, ĉar ĝi enhavas nek la Esperantan "e" nek la Esperantan "u."

Ne estas utile disputi pri diftongoj, ĉar ĉiu havas siajn proprajn ideojn pri diftongoj; sed oni devas rimarki ke la au germana kaj la eŭ germana estas tiom diftongaj kiom la eŭ Esperanta. (See the German Grammar of Wm. D. Whitney, Professor of Comparative Philology, Yale University, where the diphthongal character of the German au and eu is shown.) Se tial oni kondamnas la Esperantan "diftongon" eŭ, oni egalrajte devus kondamni la germanan elparolon de "eŭ" kaj de "aŭ."

Pri la korekta elparolo de "e" kaj "o," ni ne povas fari pli bone ol citi la jenan avizon de

Sro. Beaufront, elĉerpitan de la Aprila numero de l'Esperantiste:—

“Miapartè sen ia ŝanceliĝo mi konkludas al la sekvanta prefero: ĉie kaj ĉiam a = a de *bas* france (*father angle*), e = e de *dé* france (*aerial angle*), i = i de *mi* france (*me angle*), o = o de *dos* france (*omit angle*), u = ou de *mou* france (*too angle*), sen malgraciaj longigo kaj pezigo. Sed se okaze pro tiu aŭ alia kaŭzo, pro nacia kutimo pli ĝuste, vi faras la sonon *iomete* malfermita (with a “shortened” English sound) ne elŝiru viajn harojn, sed ne celu tion (but do not aim at these “shortened” sounds).

Du kongresoj montris al la Esperantistoj, ke tiuj nuancoj ne havas tiom da graveco, ke ili povus malhelpi la interkompreniĝon.”

Ekzemple al la 5 esperantaj vokaloj oni povas doni prononcon ĉu longan aŭ mallongan, ĉu fermatan aŭ ne, pli aŭ malpli sonan, akran, sen ŝanĝi la signifon de l'vortoj.

La 5 vokaloj ĝuas, por ilia prononco, ian “marginon aŭ interspacon de nedetermino,” dank' al kiu la neevitebla diverseco de l'prononcoj senkondukas nenian dusencaĵon.

El la Belgia Sonorilo, 19an de Majo.

LA VIVO

(De la franca poeto Lamartine.)

En koro mi diris: Kion fari el vivo?
Miajn antaŭulojn, ĉu mi devas sekvi,
Kvazaŭ la ŝafido sekvas la patrinon?
Imiti la homon, ĉiam la frenezan?
Unu serĉas la Memnajn trezorojn sur maro;
Sed ŝipon, dezirojn, la ondo englutas.
En gloro, kiun la genio enspiras,
Alia mortiĝas, ebria per famo.
Per siaj pasioj, vastan reton formantaj,
Tiu fondas tronon, altiĝas por fali. . .
Preferante cedi, en pli dolĉa reto,
Tiu sorton legas en virin-okuloj. . .
Mallaboremulo ekdormas malsate. . .
Plugisto kondukas fruktdonan plugilon. . .
Scienculoj pensas, mortigas soldatoj. . .
Almozul' sur bordo de l'vojo sidiĝas. . .

Kien ili iras? Tien la folio
Iras, forblovate per vintra ventego.
Same en diversaj laboroj sekigiĝas
Ĉiuj, kiujn tempo semas kaj rikoltas. . .
Ili bataladis, sed venkis la tempo.
Kvazaŭ riverego englutas bordsablon,

Ĝi glutas iliajn forkurantajn ombrojn.
Naskiĝo! . . . Mortiĝo! . . . Ĉu estas vivo? . . .

Mi kantos la Dion, kiun mi amegas,
En urboj bruegaj, en pacaj dezertoj,
Kusantan sur bordo, flotantan sur maroj,
Je la sunkuŝiĝo, je la sunleviĝo. . . .
Tero al mi krias: Kiu estas Dio?
Li, kies animo grandeg' ĉies estas,
Li, kiu per paŝo la spacon mezuras,
Li, de kiu la suno elpruntas brilecon. . .
Li tiris el nenio la materion,
Li fondis la universon sur la malpleneco;
Li, kiu senlima enŝlosis la marojn,
Li kreis la lumon per unu rigardo,
Li, kiu nek tagon, nek morgaŭ, ne konaŝ;
Li, kiu el ĉiam, el si mem, naskiĝas.
Li vivas estonte sama kiel estante,
Foririntan tempon li povas revoki.

Dio, li estas. Mia lango rediru
Gloran lian nomon, al mortemulidoj,
Kvazaŭ orlampo ĉe lia altaro
Mi kantos nur por li, ĝis li min frakasos.

Tradukis Pro. A. M. Grillon, Philadelphia.

KRONETIKO (Continued)

The Toledo Esperanto Club continues to make good progress. It has recently affiliated with the A. E. A. The subscription to the Journal thus secured will be utilized by placing our official organ in the Toledo Public Library,

where it will be accessible to the general public. A notice of a club meeting recently published in a local paper brought many inquiries. We hope soon to be able to conduct all our business meetings in “the kara lingvo.”

LA INTERNACIA LINGVO KAJ LA AKADEMIJO

At a meeting on the 13th of April the Section of Sciences of the Royal Belgian Academy voted favorably on a proposition made by the Viennese Academy, which aims at putting on the regular program of the Association of Academies the question of an international language. Consequently it disapproved a second proposition which looked toward a declaration that the Association is incompetent to solve such a question.

In other words this section of the Belgian Academy has passed a double resolution of great importance: it thinks that the Association of Academies is competent to decide the question, and it desires that the Association should take upon itself the choice of the language. These propositions are now being submitted to all scientific academies.

At its meeting on the 19th of April the Academy of Inscriptions and Belles-Lettres in Paris decided unanimously, with uplifted hands and with indignation, that it did not like the proposal of the Academy of Vienna, which looked toward the examination of the question of an international language.

That does not prevent the progress of the question: (for) this Academy is accustomed to solve all progressive questions in an expert, original, powerful manner.

The report of the meeting of this Academy on the 12th of March, 1878, is very curious, and shows the severity as well as the importance of its official decisions:

"Yesterday, during the meeting of the Academy, an American inventor by the name of Edison presented a strange apparatus, which he called a phonograph, and by which he assured us that he reproduces the human voice. But the scientist, M. Boullard, interpreting the indignation of his colleagues, advised the inventor to respect the Society, and cried out: 'Sir, we have not been deceived by a clever ventriloquist.'"

The Academy continues its effective labors. (Translation from an article in *La Belga Sonorilo*, 4 May, 1907.)

"I will engage you as a clerk to start with," said the merchant, "and I will pay you what you are worth. Is that satisfactory?"

"Oh, certainly," said the ex-collegian, "but—do you think that the firm is able to pay so much?"

En kunsido de la 13a aprilo, la Klaso de Sciencoj de la Reĝa Akademio de Belglando voĉdonis favore pri unua propono farita de la Akademio de Vienno, celanta enlokigi la demandon pri Internacia lingvo en la Tagordo de la Asocio de la Akademioj. Ĝi sekve voĉdonis malaprobante la duan proponon, celantan deklaron per kiu la Asocio estus nekompetenta por solvi tiun demandon.

Alivorte, la Akademio de Belglando starigis duoblan decidon ĉefe gravan: ĝi opiniis ke la Asocio de la Akademioj estas kompetenta pri la elekto de Internacia lingvo, kaj deziris ke la Asocio povu preni sur lin, la elekton de tiu lingvo. Tiuj proponoj estas nun submetitaj al ĉiuj sciencaj Akademioj.

En ĝia kunsido de la 19a aprilo, la Akademio de la Enskribaĵoj kaj Beletristiko en Parizo decidis, unuanime, per mana monstro kaj kvazaŭ indigne, ke ĝi ne ŝatas la deziran proponon de la Akademio de Vienno, celantan la ekzamenon de la demando pri universala (internacia) lingvo.

Tio ne malhelpas la antaŭeniron de la demando, tiu Akademio kutimas solvi ĉiujn progresemajn demandojn per sperta, originala kaj potenca decido.

La raporto pri kunsido de tiu Akademio de la 12a de Marto 1878 estas tre kurioza, kaj montras la severecon kaj ankaŭ la gravecon de ĝiaj oficialaj decidoj:

"Hierau, dum kunsido de la Akademio, amerikana elpensinto, nomata Edison, prezentis aparaton strangan, kiun li nomas fonografon, kaj per kiu li certigas ke li reproduktas la homan voĉon. Sed la scienculo Sro. Bouillard, tradukante la indignon de siaj kolegoj, admonis la elpensinton (!) por ke li respektu la kolegaron kaj ekkriis: Sinjoro, ni ne estas trompitaĵ de lerta ventriloko (ventroparolanto)."

La Akademio daŭrigas sian efikan (!) laboron.

El *Belga Sonorilo*.

"Komencante mi dungos vin kiel komizon," diris la komercisto, "kaj mi pagos al vin tiom, kiom vi valoros. Ĉu tio estas ŝatinda?"

"Ho, certe," diris la eks-kolegiano, "sed—ĉu vi pensas, ke la firmo povas pagi tiom multe?"

(Tradukita W. S. Hamburger, Baltimore, Md.)

ROSKO

The *New York Herald* vouches for it that there is a good mule in Richfield, N. J., named Roscoe. His owner, Arthur Paget, swears that a more talented or lovable mule never pricked up his ears. But in spite of that, some rascal has abused Roscoe, transforming him into an object streaked with paint in such a manner that he himself does not know whether he is a mule or an oil painting,—and the mournful look in his eyes apparently asks for information on that point.

If Roscoe was not so popular the community at Richfield would not share so much in his mortification. Soap and boiling water applied to his skin, and other heroic remedies, have not succeeded in taking away his zebra-like appearance and restoring his customary mulish aspect. Therefore, his master, as well as his friends and well-wishers, are searching, with vengeful purpose, for the culprits, probably boys, who have done their work so well that, according to the testimony of honest Paget, Roscoe will never be himself again.

The local historians say that there are reasons why Roscoe should become universally esteemed. They call him a mule among mules, say that he can do more work in one day than a whole army of other mules. Besides that, in the evening he usually amuses the children by carrying them on his back. Moreover, he is a mule hero. Once a certain seven-year-old boy, who was gathering flowers on the shore, fell into the mill pond. No one but Roscoe was near. Without hesitating a moment, he jumped into the water and saved the boy, who was just about to be thrown upon the mill wheel. Then he carried him home and laid him on the door sill. On another occasion, the stable of his master caught fire, and Roscoe, by kicking the wall broke a hole through which he led the other animals out of the burning building. By such deeds Roscoe has become famous in his home circle.

His temperament is both lively and also docile. He greatly enjoys all kinds of sports, especially the ball game between the "Hay-makers" and "Rubes," which is an occasion of very great importance in that locality.

Therefore the lament at his present state is loud, and whoever it was that did the wicked act of painting his skin, if discovered, will fare badly.

Certigas *La Nov-Jorka Herald*o, ke sin trovas en Riĉfield, N. J., unu bona mulo nome Rosko. Ĝia posedanto, Arturo Paĝet, atestas, ke neniam starigis la orelojn mulo pli talenta kaj aminda ol tiu. Sed spite tio, iu fripano trouzis Rosko'n, aliigante ĝin en objekton per kolorilo strekitan, tiamaniere, ke ĝi mem ne scias, ĉu ĝi estas mulo aŭ olea pentraĵo,—kaj la rigardo funebra el ĝiaj okuloj ŝajne petas pri tiu demando informon.

Se Rosko ne estus tiel ĉopola, la loĝantaro ĉe Riĉfield ne tiom partoprenus ĝian ĉagrenon. Sapoj kaj akvo bolanta almetitaj sur ĝian haŭton, ankaŭ aliaj rimedoj heroaj, ne prosperis forigi de ĝi la zebrian ŝajnon kaj redoni ĝian kutiman rigardon mulsimilan. Tial ĝia mastro, ankaŭ ĝiaj amikoj kaj bonvolantoj, serĉas venĝeme la krimulojn, kredeble knaboj, kiuj estas tiel bone laborintaj ke, laŭ la atesto de l'honesta Paĝet, neniam denove Rosko fariĝos si mem.

Rakontas la historiskribantoj lokaj, ke ekzistas kaŭzoj, kial Rosko devas esti estimata tutmonde. Ili nomas ĝin mulo inter la muloj, diras ke ĝi povas plu labori en unu tago ol tuta armeo da aliaj muloj. Krom tio, vespere ĝi kutimas amuzi la infanojn, portante ilin sur sia dorso. Plie ĝi estas mula heroo. Foje unu sepjara knabo, kiu kolektadis florojn sur la bordo, enfalis en la muellageton. Neniu krom Rosko estis apuda. Ne ŝanceliĝinte momenton, ĝi enakviĝis kaj savis la knabon ĵus ĵetotan sur la radon de l'muelo. Tiam alportinte lin domen, Rosko kuŝigis lin sur la pordan sojlon. Alifoj la brutejo de ĝia mastro ekbruliĝis kaj Rosko, piedfrapinte la muron, rampis truon tra kiu ĝi elkondukis el la konstruaĵo brulanta la aliajn bestojn. Pro tiaj agoj fariĝis Rosko fama en sia hejma rondo.

Ĝia temperamento estas kaj vigla ankaŭ obeam. Ĝi tre ĝuas ludojn ĉiuspecajn, aparte la pilkludon inter la "Fojnfarantoj" kaj "Ruboj," kiu estas okazo tre grava en la tiea loko.

Tial la bedaŭro pro ĝia nuna stato laŭtiĝas, kaj kiu ajn faris la malbonecon pentran sur ĝian haŭton, kiam li estos eltrovita, certege malprosperos.

NUNTEMPAJOJ EN JAPANUJO

(El la Japana Esperantisto.)

Unuformigeo de Latinlitera silabo.—Latinlitera Propaganda Societo, kiu celas anstataŭi la japanan propran literon per la latina litero, lasis ĝis nun tre libere la silabimanageron. Sekve, en Japanujo ekzistas dekoj da latinliteraj silabimanageroj, ĉar ĉiu skribas laŭ ĉia gusto. Tiel, lia organo "Romaĵi" metigas sin preskaŭ en malordo.

De mallonge ĝi eksentis la neceson de la unuformigeo de l'silabo, kaj petis la anojn ke ili proponos al la societo ian planon pri tio. Dro. Kroita, reprezentante Japanan Esperantistan Asocion, respondis al ĝi, ke ĝi devas tute uzi la esperantan silabimanageron.

Latinlitero en Parlamento.—Latinlitera Propaganda Societo gajnis fine la venkon en la Parlamento. Kun granda plimulto pasis la propono ke oni uzos la latinliteron kiel leciono memvola en la elementaj lernejoj.

Pri tio, Sro. Saŭajanagi, Vic-Ministro de

Edukado, diris:—"Mi konsentas kiel individuo al la propono, ke la Romanizita silabado de la Japana lingvo estu instruata en niaj elementaj lernejoj. Eĉ la Ministro farus nenian kontraŭparolon al ĝi. Sed, pri la demando per kia metodo ĝi devas esti praktikata, estas nenia fiksa opinio en la Departemento de Edukado. La Komitato pro la esploro de la Japana lingvo estas veninta al la konkludo ke la Ĥinaj ideografoj devas esti neniigataj kaj iaj fonetikaj literoj devas esti alprenataj. Sed la demando estas ĉu ili estos 'Kana' (Japanaj literoj) aŭ latinaj literoj aŭ Sanskritaj literoj; ĉu ni faros novajn literojn. Ĝi estas tre malfacila demando, sed mi kredas ke latinaj literoj estas plej facilaj."

Nova Prezidanto de la Nobla Lernejo.—Generalo Barono Nogi kiu faris lin mem fama en la sieĝo de Port Arthur estas farita la Prezidanto de la Nobla Lernejo en Tokio.

INTERNACIA ESPERANTISTA PRORAGANDEJO

La laboro kaŭzita de la eldono kaj disvastigado de miaj ŝlosiloj tiom pliiĝis kaj kreskis, ke mi jam ne estas kapabla plenumi ĝin sola.

Por doni malgrandan ideon pri la kreskado eble sufiĉas diri, ke dum la pasinta jaro miaj presistoj ricevis la sumon de 16,000 frankoj, kaj ke la valoro de la provizo da ŝlosiloj kaj de la nepagitaj ŝuldoj reprezentas sumon de preskaŭ 10,000 frankoj, kiu sumo kredeble duobliĝos en la nuna jaro, ĉar estos eldonataj 6 novaj ŝlosiloj.

Por daŭrigi la eldonadon de tiuj ĉi propagandiloj en ĉiuj lingvoj, kaj por certigi la sendependecon de la entrepreno, kaj ke ĝi servu nur al la propagando, ne celante mongajnon, mi formis, sub la nomo *Internacia Esperantista Propagandejo*, komitaton el la sekvantaj sep anglaj Esperantistoj:—Sro. James Blaikie, M.A. (Cantab.); Major-Generalo George Cox, B.A. (Cantab.); Sro. H. F. Höveler (E. Cefeĉ); E. L. Kearney, M.A. (Cantab.); E. A. Millidge, ĉefredaktoro de *The British Esperantist*; H. Bolingbroke Mudie, ano de la Kongresa Komitato en Cambridge; S. Nicholl, Hon. Sek. de la B. E. A.;—sub la estreco de Major-Generalo Cox; kaj al tiu komitato mi transdonis ĉiujn ĝis nun aperintajn propagandilojn, kune kun ĉiuj rajtoj kaj privilegioj.

La ĉefa celo de la propagandejo estas la eldono kaj disvendo de—

(1) Propagandaj ŝlosiloj enmetebaj en leterojn kaj pezantaj 5 gramojn, je la vendprezo de 5 centimoj.

(2) La samaj libretoj presitaj sur pli bona papero kaj kun ia aldono por pravigi pli altan prezon, kiu ebligas disvendadon per helpo de librovendistoj, je la vendprezo de 10 centimoj.

La kapitalo necesa por plukonduki la entreprenon tra almenaŭ tri jaroj estas garantiata kaj prunte donita de unu el la komitatanoj, kiu ankaŭ garantias la komitatanojn kontraŭ perdo.

Tiu ĉi komitato elektos kunhelpantan internacian konsilantaron po 3 konsilantoj de ĉiu lingvo.

La letera adreso de la komitato estos:—

Internacia Esperantista Propagandejo,

Merton Abbey, London, S. W.

kaj mi petas ĉiujn Esperantistojn, ke de la 1a de Majo ili direktu ĉiujn leterojn, mendojn kaj mensendojn al tiu ĉi adreso.

Se ia nacio ne povas atendi ĝis kiam la komitato eldonos ŝlosilon en ĝia propra lingvo, mi persone estas preta pagi la sumon de 50 frankoj al la kosto de tia nova ŝlosilo, se iu Esperantisto volos entrepreni, li mem, ĝin eldoni. Mi havas nur unu kondiĉon, ke ĝi estu absolute sampeza kaj samenhava kiel la nunaj eldonoj, kaj ke la eldonistoj entreprenu vendi ilin afranke ĉien en la mondo po 3.50 frankoj por cento.

E. Cefeĉ.

LA PROPAGANDO EN LA MARISTARO

Nuntempe oni bedaŭrinde devas konfesi, ke la esperanta movado ĉe la maristoj estas kvazaŭ nula. La kelkaj provoj faritaj tute ne efikis, eble ĉar ili estis izolitaj.

Tamen tre utila estus la disvastiĝo de Esperanto ĉe la maristoj, ne nur pro la profitoj, kiujn la uzo de nia lingvo alportus al la marveturantoj, sed ankaŭ por la ĝenerala propagando.

Efektive, dum la teranoj estas kvazaŭ najlitaj sur sia lando, kaj pro tio malebligataj komuniki parole kun la fremduloj, konigi palpe la progresojn de nia afero, la maristoj, tramigrantaj ĉiujn marojn, povas montri al la ĉiunaciaj neesperantuloj nediskuteblajn pruvojn de la taŭgeco kaj de la tutmonda prospero de Esperanto.

Oni ne devas kaŝi la malfacilaĵojn de la propagando ĉe la maristoj; la kondiĉoj estas ja tute malsamaj ol la ordinaraj pro la konstantaj translokiĝoj de la personoj, kiujn oni devas varbi. Oni devos santempe atingi la milit-kaj komercmaristojn; ĉe la unuaj ni certe trovos ŝatindan nombron da bonvoluloj, kiuj lernos nian lingvon por enkonduki ĝin ĉe siajn kolegojn, kaj faros tion por la ideo mem; sed estas ne malpli necese, ke oni varbu la duajn, kvankam la praktikaj profitoj rezultantaj de la uzo

de la lingvo estas ankoraŭ malgrandaj, kaj ke tiu fakto malfaciligas la taskon.

Ni do pensas, ke oni devas fari seriozan klopodon—kaj eble dum longa tempo—por sukcesi.

Hodiaŭ ni sendas alvokon al ĉiuj Esperantistoj, maristaj aŭ ne, por peti, ke ili diru al ni, ĉu ili aprobas nian iniciaton, por ke ili varbu aprobantojn inter la maristoj aŭ personoj konantaj la maristaron, fine, por ke ili sciigu al ni la ideojn, kiujn ili havas pri la metodoj uzotaj por bone kaj rapide propagandi nian aferon.

Kiam ni konos la nomojn de la personoj aprobantaj la kreon de nia Ligo, ni penos por fondi la Francan Grupon de la Ligo kaj, se estas necese, por helpi la fondon de la alilandaj Grupoj.

La personoj aprobantaj estas petataj sendi al Sro. René Mesny, La Huguette, à Granville, Manche, France, siajn aprobojn kaj adresojn.

Aliparte, tiu aprobo neniel devigas la aprobanton al ia monfero.

René Mesny, profesoro de marveturarto, Granville (Manche).

Samuel Meyer, ŝipmakleristo, La Rochelle (Charente-Inférieure).

Rillet de L'Isle, marista ĉefingenero, Paris (Seine).

KORESPONDADO FAKO

Al la fremduloj neanglo parolantaj: oni enmetas senpage en tiu ĉi Fako viajn nomojn kaj adresojn. Skribu tre klare, kaj diru ĉu vi jam legis la Krestomation.

Fino. Emily W. Ehrhart, Stock Street, Hanover, Penna., U. S. A., deziras interŝanĝi poŝtkartojn (se eble kolorigitajn), precipe kun ĉiuj kiuj ne anglan lingvon parolas, kaj sendos belan karton kun vidaĵo de fama batalkampoj de Gettysburg.

Sro. S. L. Heabler, Attica, Ohio, U. S. A., deziras korespondadi kun fremduloj kaj Amerikanoj. Jam legis Krestomation.

Sro. George Story, Office of City Engineer, San Luis Obispo, Calif., U. S. A., deziras korespondi kun hispano-parolanta persono, pre-

fere kun Meksikano. Povas legi la romancajn lingvojn.

Saratov, Russia. Anoj de la Saratova Esperantista Societo deziras korespondadi kun alilanduloj. Sin turnu al Sro. Simeon P. Poltavskij, Malaja Zatonaja 6, Saratov, Russia.

Every member of the American Association can have an announcement put in the Korespondado Fako for 10 cents. The announcement must not contain more than 15 words besides the name and address, and it must be sent on a *separate slip of paper, either typewritten or printed in capitals with a pen.*

Other persons can have announcements inserted at double the above rates.

“Dear John,” wrote a wife from the seashore, “I enclose the hotel bill.”

“Dear Mary,” he wrote in reply, “I enclose a check; but please don't buy another hotel at such a price—it is too expensive.”

“Kara Johano,” skribis edzino de la marbordo, “mi enmetas la hotelan kalkulon.”

“Kara Mario,” li skribis respondante, “mi enmetas ĉekon; sed bonvolu ne aĉeti alian hotelon je tioma prezo—estas tro karpreze.”

LA VIRO SENPATRUJA

(“THE MAN WITHOUT A COUNTRY.” BY DR. EDWARD EVERETT HALE.)

TRADUKITA KUN PERMESO DE LA AŬTORO PER E. L. ROBINSON, KALAMAZOO, MICH.

(daŭranta.)

Jen la letero:

Levant, 2° 2' Sude kaj 131° Okcidente.

Kara Fred:—Mi provas trovi la koron por sciigi vin, ke ĉio finiĝis por “Kompatinda Nolan.” Mi estis kun li dum ĉi tiu kruzo pli da tempo ol mi iam estis antaŭe, kaj mi povas nun kompreni vian dirmanieron, kiam vi priparolis pri la kara maljunulo. Mi povis vidi ke li ne estas forta, sed mi ne eĉ pensetis, ke la fino staras tiel proksime. La kuracistoj observadis lin tre zorgeme, kaj hieraŭ matene oni alvenis por sciigi min, ke Nolan plie malsaniĝas, kaj ne ankoraŭ eliras el sia ŝipĉambro,—afero kiun mi ne povis memori esti okazinta antaŭe. Li permesis ke la kuracisto alvenu kaj rigardu lin tie kuŝantan,—tio estis la unua fojo ke la kuracisto estis en lia ŝipĉambro,—kaj li diris ke li deziras vidi min. Ĉu vi rememoras la misteriojn, kiujn ni junuloj kutimis elfari pri lia ĉambro en antaŭaj tagoj, kiam ni estis sur la “Intrepid”? Nu mi eniris, kaj tie vere la kompatindulo kuŝis en sia liteto, ridetante aminde kiel li donis al mi la manon, sed ŝajne tre malforta. Mi ne povis ne ĉirkaŭrigardi, kaj la ekrigardeto elmontris al mi, kian kvazaŭan altareton li elfaris el la skatolo, en kiu li nun kuŝas. La “Stelojn kaj Striojn” li pendigis super kaj ĉirkaŭ portreto de Washington; kaj li estis pentrinta majestatan aglon kun fulmaro brila en ĝia beko, kaj kun la talonoj ĉirkaŭprenantaj la tutan terglobo, de ĝiaj flugiloj ombrigitan. La maljuna karulo vidis mian rigardeton kaj diris, malgaje ridetante, “ĉi tie vi vidas ke mi havas patrujon.” Kaj tiam li manmontris al la malproksima parto de la lito, kie mi vidis tion kion mi neniam antaŭe vidis,—grandan karton de la Unuigitaj Ŝtatoj, ĝuste kiel li pentris ĝin laŭ memoro, kaj kiun li gardis por ĝin vidi kiel li tie kuŝis. Strangaj nomoj maljunaj estis sur ĝi, je grandaj literoj—“Indiana Provinco, Mississippi Provinco, kaj Louisiana Provinco. Tiel, mi supozas, niaj antaŭuloj lernis tiajn aferojn, sed la maljunulo enmetis Texas ankaŭ. Li etendigis la okcidentan landlimon al la Pacifika Oceano, sed sur tiu marbordo li nenion difinis.

“Ho, Danforth,” li diris, “mi scias ke mi mortigas. Mi ne povos reveni hejmen. Neeble ke

vi ne diros ion al mi nun. Silentu, silentu, ne parolu ĝis tiam kiam mi diros tion, pri kio mi estas certa ke vi scias, ke ne estas en tiu ĉi ŝipo, ke ne estas en Ameriko,—Dio benu ĝin,—pli fidela viro ol mi. Viro ne vivas kiu amegas la maljunan flagon tiom, kiom mi ĝin amas, aŭ kiu preĝas pri ĝi aŭ esperas por ĝi tiom kiom mi. Estas tridekkvar steloj en ĝi nun, Danforth. Mi dankas al Dio pro tio, kvankam mi ne scias iliajn nomojn. Neniam oni forprenis eĉ unu; mi dankas al Dio pro tio. Mi scias per tiu fakto, ke Burr neniam kaj neniel sukcesis. “Ho, Danforth, Danforth,” li elĝemetis la vortojn, “kiel similaj al malbona sonĝo ŝajnas la ideoj de knabo pri persona famo aŭ aparta regado, kiam oni rerigardas al ĝi post tia vivo kia la mia. Sed diru al mi ion—ĉion—antaŭ ol mi mortos.”

Ingham, mi ĵuras al vi, ke mi sentis min monstro tial, ke mi ne jam diris ĉion al li antaŭe. Ĉu danĝere aŭ ne, ĉu delikate aŭ ne, kial mi agis kiel tirano kontraŭ tiu ĉi kara, sankta maljunulo, kiu pagis dum sia tuta vivo plenkreska, la malsaĝecon de knaba malfideleco. “Sinjoro,” mi diris, “mi rakontos ĉion pri kiu vi demandas, sed kie mi devas komenci.”

Ha, la feliĉa rideto aperanta sur lia blanka vizaĝo! Li premis mian manon kaj diris, “Dio benu vin. Diru al mi iliajn nomojn,” li demandis, manmontrante al la steloj sur la flago. “La lasta kiun mi scias estas Ohio. Mia patro loĝis en Kentucky, sed mi divenis Michigan kaj Indiana kaj Mississippi—la Adams Fortikajeto estis en Mississippi. Ili esta dudek. Sed pri la aliaj dekkvar? Vi ne dividis iun el la maljunaj ŝtatoj, mi esperegas.”

Nu, tio ne estas malbona temo, kaj mi klarigis al li la nomojn laŭ vico; post kio li postulis, ke mi prenu krajonon kaj laŭ mia povo, pentri ilin sur lian belegan karton. Li treege gajigis pri Texas,—rakontis ke lia kuzo mortis tie; montris la lokon proksime al tie, kie li supozis ke la tombo de sia kuzo staras, kaj diris ke li jam divenis ke Texas estas ŝtato. Ankaŭ li tre gajigis, vidinte Kalifornion kaj Oregonon, pri kiuj li diris ke li antaŭe pensetis, parte ĉar oni neniam permesis al li elŝipiĝi sur tiun marbor-

don, kvankam la ŝipoj tie estis tre ofte. "Kaj la maristoj," li diris ridante, "reportis multon krom feloj." Tiam li turnis sin al la estinteco,—ho ĉieloj kiel malproksima,—por demandi pri la Chesapeake, pri tio kion oni faris al Barron, ĉar li kapitulaciis ĝin al la Leopard; kaj ĉu Burr iam faris alian provon, kaj li grincis la dentojn pro la sola pasio kiun mi iam vidis lin elmontri. Sed post momento tiu pasio finiĝis kaj li diris, "Dio pardonu min, ĉar mi estas certa ke mi pardonas lin." Tiam li demandis pri la malnova milito,—rakontis al mi la veron pri sia komando de la paflego en la tago kiam ni kaptis la Jav'o'n,—faris ankaŭ demandon pri kara, maljuna David Porter, kiel li nomis lin. Tiam li kuŝiĝis kviete kaj feliĉa, ĉar li estis aŭdonta dum unu horo la historion de kvindek jaroj.

Kiom multe mi deziris, ke estu iu kiu ion sciis. Sed mi faris laŭ mia plej granda povo. Mi diris al li pri la angla milito. Mi rakontis pri Fulton kaj la naskiĝo de la vaporŝipo. Mi diris pri maljuna Scott kaj Jackson; diris al li ĉion kion mi rememoris pri Mississippi, Orleanzo, Texas, kaj lia propra maljuna Kentucky. Kaj imagu, li demandis pri tiu kiu komandis la Legion de la Okeidento. Mi respondis, ke la komandanto estas tre brava oficiro nomita Grant, kaj ke li estas, laŭ niaj plej lastaj novaĵoj, starigonta sian ĉefoficejon ĉe Vicksburg. Tuj poste, "kie estas Vicksburg?" Mi montris ĝin sur la karto. Ĝi kuŝas centon da mejloj plimalpli malproksime de lia maljuna Adams Fortikaĵeto, kiu, mi pensas, eble estas ruino. "Ĝi devas esti ĉe la plantejeco de Vicks, sur la Walnut'aj Montetoj," li diris. "Nu tio estas granda ŝanĝo."

Mi certigas vin, Ingham, ke ne estis facile mallongigi la historion de duono da jarcento en interparoladeto kun malsanulo. Kaj nun mi ne bone scias, kion mi pritraktis por li,—pri enmigrado kaj ĝiaj rimedoj, pri vaporŝipoj, fervojoj, telegrafoj, pri eltrovoj kaj libroj kaj literaturo, pri kolegioj kaj West Point kaj la Ŝipara Lernejo ĉe Annapolis, kaj liaj interrompadoj estos el la plej strangaj.

Ekzemple, li demandis neatendite, kiu estis la nuna Prezidanto; kaj post kiam mi sciigis lin pri tio, li demandis ĉu Lincoln estas filo de Generalo Benjamin Lincoln. Li diris, ke li renkontis maljunan Generalon Lincoln, estante nur knabo, ĉe la traktado de ia ruĝovaĝula pacigo. Mi neis, kaj klarigis ke Prezidanto Lincoln devenis el Kentucky, kiel li mem, sed mi ne povis diri de kiu familio—li estis memkreitulo. "Bone! Bone!" kriis Nolan. "Tio ĝojigas min. De longe mi pensadis kaj miradis pri tia aferoj, kaj mi decidis ke la granda danĝero por nia

lando sin kaŝas en la daurigo de regula here-deco en la ĉefaj familioj." Tiam mi ekparolis pri mia unua vizito en Washington, kiel mi konatiĝis kun la Oregon Kongresano. Mi rakontis pri la Smithsonian'a Instituto kaj la vojaĝoj por esplorado, pri la Kapitolo (Parlamenta Domego), pri la statuoj por la antaŭflanko, pri la jenaj, la "Mallibereco" de Crawford kaj la "Washington" de Greenough. Ingham, mi diris ĉion kion mi povis memori, kio elmontris la grandecon de lia patrujo kaj ĝian prosperecon. Sed mi ne eĉ povis paroleti pri tiu ĉi ribelado.

Kaj li entrinkis ĝin, kaj ĝin ĝuis pli ol mi povas esprimi. Li pli kaj pli silentiĝis, tamen mi ne pensis, ke li estas laca aŭ malforta. Mi donis al li glason da akvo, sed li nur malseketiĝis la lipojn, kaj postulis ke mi ne foriru. Tiam li petis, ke mi alportu la Presbyterian'an Libron de Publikaĵaj Preĝoj, kiu proksime kuŝis, kaj ridetante diras ke ĝi malfermiĝos je la ĝusta loko,—kaj tiel ĝi faris. Tie estis lia duobla streko ruĝa, de supro malsupren sur la paĝo; kaj mi surgenuiĝis kaj legis, kaj li diris kun mi la jenan preĝon: "Pro ni mem, kaj pro nia patrujo, ho aminda Dio, ni dankas Vin; kaj tial ke, malgraŭ niaj multaj rompadoj de Viaj sanktaj leĝoj, Vi daŭrigis al ni Viajn bonaĵojn," k. t. p. al la fine de la dankpreĝo. Tiam li turnis la librofoliojn ĉe la fino de la sama libro, kaj mi legis la vortojn pli konatajn de mi: "Plej kore ni petegas ke Vi, per Via favoro surrigardu Vian servanton, la Prezidanton de l'Unuigitaj Ŝtatoj, kaj ĉiujn aliajn aŭtoritatojn," kaj tiel al la fino.

"Danforth," li diris, "mi rediradis tiujn preĝojn ĉiunokte kaj ĉiumatene dum kvindek kvin jaroj. "Poste li diris, ke li deziras dormi. Li min klinigis super lin, kaj min kisis kaj aldonis, "Serĉu en mia Biblio post kiam mi estos mortinta, Danforth," kaj mi foriris.

Sed mi ne pensetis, ke tio estas la fino. Mi opiniis ke li laciĝas kaj volas dormi. Mi sciis ke li feliĉiĝas, kaj mi deziris ke li estu tute sola.

Sed post unu horo, kiam la kuracisto eniris kviete, li trovis ke Nolan jam elspiris sian vivon kun rideto. Li premeĝis ion al siaj lipoj,—estis la medalo patra de la Ordeno de Cincinnati. Ni serĉis en lia Biblio, kaj tie estis paperaĵeto en loko, kie li jam montris la jenan:—"Ili deziras landon eĉ ĉielan. Tial Dio ne hontas esti nomata ilian Dion, ĉar li preparis por ili urbon." Sur tiun ĉi paperaĵeton li estis skribinta, "Entombigu min en la maro. Ĝi estis mia hejmo kaj mi ĝin amas: sed ĉu oni ne starigos ŝtonon por memoraĵo ĉe la Adams Fortikaĵeto aŭ en Orleanzo, por ke mia mal-

honoro ne estu pli ol mi devas porti? Diru sur ĝi,

“Al Memoro de
Felipo Nolan

Leŭtenanto en la Armeo de la Unuigitaj Ŝtatoj. Li amegis sian patrujon tiom kiom neniu alia viro iam ĝin amis; sed neniu alia meritis malplu el ĝiaj manoj.”

(Fino.)

BOOK REVIEW

Rapport sur l'Esperanto adressé à M. de Ministre de l'Instruction Publique par TH. CART, Agrégé de l'Université, Professeur au Lycée Henri IV et à l'École libre des Sciences politiques, suivi d'une Note sur l'Esperanto chez les Aveugles; 24 p. 18x22. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo: 22 cendoj (U. S. postage stamps) por la Esperanta propagando inter blinduloj.

Although especially written for Frenchmen, and from the French standpoint, this report about Esperanto is very important and very interesting for all persons. It was presented by Professor Cart to the Minister of Public Instruction when the proposal made by M. Cornet was made to the Chamber of Deputies for the official acceptance of Esperanto in the Public Schools. It is a clear résumé of all arguments for Esperanto, and skillfully answers the attacks against an artificial language. It is sold for the profit of the propaganda of Esperanto among the blind. We heartily recommend it to those who can read French.

Solvo de la problemo de lingos internacia, kun germana traduko de Pro. Christaller de Stuttgart. Der Inhalt dieses Büchleins, das der “Fundamenta Krestomatio” von Dr. Zamenhof entnommen wurde, ist ein von einem anonymen Verfasser hergestellter Bericht, der in etwas geänderter und verkürzter Form von Beauftragten auf dem Kongress der französischen Gesellschaft für den Fortschritt der Wissenschaften (Paris 1900) verlesen worden war.

Den deutschen Esperantisten, insbesondere den Anfängern, wird dieses Büchlein sehr nützlich sein. Sie werden aus demselben doppelten Vorteil ziehen: Die Erlernung des Esperanto an der Hand eines *mustergültigen* Textes mit *fast wortgetreuer Uebersetzung*, und ein grundlegendes Studium der theoretischen Seite der Frage einer internationalen Sprache.

We can not too highly recommend this book; we hope soon to see an English translation of it. The book contains 125 pages, and is to be obtained directly of Esperanto Verlag Möller & Borel, 95 Prinzessinstraße, Berlin S., Germany. Price, 27 cents in U. S. postage stamps.

La Ciutaga Vivo, verkita de Fr. Swagerr kaj Ad. Finet. This book has an introduction in both French and Flemish, and vocabularies in the same languages. Three-quarters of the book, however, is altogether in Esperanto, and consists of material for conversation about ordinary daily life. This material is arranged according to the Gouin method, a sample of which follows:

“—Mia longa, bona krajono kuŝas antaŭ mi sur la granda tablo.

Mi volas skribi per ĝi,
sed mi ne povas skribi per ĝi,
ĉar la pinto de la krajono estas forrompita,
k. t. p.

This book should help one to learn to speak Esperanto. It can be obtained from the American Esperanto Ass'n, price 35 cents.

Muziko. La Librairie de l'Esperanto, 46 rue Sainte-Anne, Paris (2e), France, keeps for sale all sorts of Esperanto works. It has a special catalogue of Esperanto songs and music, theatrical pieces, etc. We should advise all Esperantist musicians and all clubs and groups to send for this. This special catalogue can be obtained from the American Esperanto Association for a two-cent postage stamp.

To the Readers of the Krestomatio.

Mr. R. Fanshawe, Bhandara, Central Provinces, India, is engaged in the important work of studying word by word and sentence by sen-

tence everything in the Krestomatio. He is doing this for the purpose of finding out any errors or difficulties which may be in this book. He asks the assistance of all Esperantists in this important work. Mere beginners in the study of the language, however, cannot help him. Therefore, do not write to Mr. Fanshawe unless you have studied Esperanto at least six months, and have *mastered* Bullen's Lessons, and can read the Krestomatio with ease.

Write plainly; use large sheets of paper; if possible, “type-write.” Always note the *page* and the *line* in which the difficulty is to be found, and write out in full the phrase itself.

GRAMMATICAL POINTS

The suffixes *ig* and *ig̃*. These are perhaps the most important suffixes in the language. They have sometimes caused confusion in the minds of beginners, but they are really not difficult to understand, if we will only examine them carefully and learn once for all how to use them.

"*ig*" signifies "to cause," "to make"; "*ig̃*," "to become." When added to *adjective* stems, their meaning is perfectly clear: "*purigi*" (to make pure, to purify), "*purig̃i*" (to become clean, to grow clean). Moreover, when they are added to *intransitive verbal* stems, there should still be no difficulty in understanding them. "*Venigi*" must mean "make to come," "procure": e. g., "*venugu kuraciston*" (get a physician). "*Veniĝi*" would mean almost the same thing as plain "*veni*" "*Mortigi*" is "to make to die, to kill"; "*mortig̃i*" is "to become dead," "*morti*" is "to die."

With some intransitive verbal stems, however, the form with "*ig̃*" acquires quite a different meaning from the simple form without any suffix. "*Sidi*" = to be sitting, to sit; "*sidigi*" = to become sitting, to sit down; "*sidigi*" = to make to sit, to make a person sit down. But all these meanings flow naturally from the meanings of the root and the suffixes: there ought to be no chance for confusion.

In the case of *transitive verbal* stems, however, such a confusion easily arises, unless one gathers the correct meaning from the rest of the sentence. For instance, "*mi sciigas*" may mean either "I make (some one) to know" or "I make (something) known." If we should expand the "*mi sciigas*" into "*mi sciantigas*" in the first case, and "*mi sciatigas*" in the second case, there would be no opportunity for confusion.

Such forms, however, are clumsy, and we can usually use the simpler "*mi sciigas*" for both the others, *if we properly construct the rest of the sentence*. "*Mi sciigas vin pri tio*" = "I

make you know (*knowing*) about this": it could not mean anything else, for "I make you *known* about this" is nonsense. "*Mi sciigas al vi tion*" = "I make that *known* to you": "I make that know (*knowing*) to you" is again nonsense.

In the same way we can determine whether "*sciigas*" means "becomes to know" or "becomes known." "*Mi sciigas pri tio*" must mean "I become knowing, I am informed about this."

From a *practical* point, however, one need not inquire too closely into the matter, for generally both the "*ig*" and the "*ig̃*" are used only as shortened forms for "*atig*," "*itig*," "*atig̃*," "*itig̃*." One can usually, therefore, say off-hand that "*mi sciigas*" means "I make *known* (*not knowing*)"; and "*mi troviĝas*," "I become *found* (*not finding*)." Indeed the "*ig̃*" suffix added to a *transitive verbal* stem can also be called a weak passive form.

Aj. The suffix "*aĵ*," when added to a *transitive verbal* stem, has usually, like the suffixes "*ig*" and "*ig̃*" in the same case, a passive meaning. Therefore "*sendaĵo*" = something *sent* (*senditaĵo*); "*ĵetaĵo*" = something *thrown* (*ĵetitaĵo*).

Ankorau and Jam. It is rather difficult to give exact English renderings of these particles. "*Ankorau*" means "still"; it indicates that there has been *no change*. "*Mi ankoraŭ tie ĉi estas*" (I am still here, I have *not* changed my position). "*Mi ne vidis lin ankoraŭ*" (I have not seen him yet, I am in the same state as I was of not seeing him).

"*Jam*," on the contrary, indicates a *change* from the former state. "*La knabo jam ne ploras*" (The boy no longer *laughs*; already he is not laughing; he laughed before, but now he has *changed* from his laughing state). "*Vi jam diris tion*" (you have said that already; now you have *changed* to the non-saying state).

During the last elections, several banners, bearing different mottoes, were displayed. A certain doctor returned home, and, seeing a crowd jeering outside the door, wondered exceedingly. He discovered the cause when he saw a banner which connected his house with the house of the undertaker on the other side of the street. It bore the motto: "United we stand; divided we fall."

En la daŭrigo de la lastaj politiko-elektoj, kelkaj elpendaĵoj portantaj diversajn devizojn, estis elmontritaj. Unu kuracisto venis domen, kaj, vidante amason, kiu ridmokus ekster lia pordo, miris treege. Li eltrovis la kaŭzon, kiam li vidis elpendaĵon, kiu kunigis lian domon kun la domo de l' ĉerklaristo sur la alia flanko de la ŝtrato: Ĝi portis la devizon: "Unuigitaj ni staras; dividitaj ni falas."

ANSWERS TO CORRESPONDENTS

All grammatical points, especially those relating to the proper use of the *suwzas* and the *preposition* are treated in detail in Cox's Grammar and Commentary. The second edition, revised and corrected, has just appeared. It also contains translations of many idiomatic English expressions, such as "as far as," "at the outset," "all right," "by the month," "insomuch as," "so much the better," etc. We should advise every serious student of Esperanto to get a copy of it. It can be obtained from the American Esperanto Association.

El and da. "El" means originally "out of"; it is also used in the sense of "among," "of"; for example, "unu el ili" (one of them). "Da" follows words denoting quantity, measure, weight, number in the sense of portion: for example, "post kvarono da horo" (after quarter of an hour). At times it is difficult to distinguish the uses of these prepositions, as with almost all prepositions, there are times when it is impossible to say just which is the correct one to use. When one comes to this "dividing" line, one can properly use any one of several.

For instance, both "la amo al la patrujo" (love toward the fatherland) and "la amo por la patrujo" (love for the fatherland) are correct. Or again "li ploris de ĝojo" and "li ploris pro ĝojo." Do we not say in English both that he was "at the University four years" and "in the University four years"?

Every preposition has its primary logical meaning; its secondary meanings will necessarily shade off into those of other prepositions. Get the primary meanings of all prepositions firmly in your head; then read attentively the *Krestomatia*; and finally study carefully Cox's Grammar and Commentary. It devotes 20 pages to Esperanto prepositions and 10 more to the proper translation of English prepositions.

Prepositions after Verbs and Adjectives.

Again we must refer our readers to Cox's Commentary or to Fruictier's *Sintakso*. Also pay especial attention to the use of prepositions in the *Krestomatia* and other good Esperanto works. A correspondent writes us that he has found the pages of the "American Esperanto Journal" very useful. He copies out of it every phrase which seems a little strange to him, and keeps these for future reference and study. It would be a good plan for others to do the same thing.

Sometimes the preposition does not need to be translated; it forms a part of the Esperanto

root. For example, "serĉi" (to look for, to search after). However, when one must use a preposition, there is generally little difficulty in finding the right one: "mi sidigis sur la seĝon" (I sat down upon the chair), "mi kriegis pro ĝojo" (I shouted for joy), "mi parolis pri ĝi al li" (I spoke of it to him). Still you must not translate the English preposition literally. It is the meaning of the preposition which you are really after: "pro ĝojo" (on account of joy, because of joy, not merely for joy); "pri ĝi" (about it, not of it).

Sometimes, however, the preposition in English is of such slight force that it is difficult to say just what it means. "Of" and "at" are often thus used. "Je" is the proper Esperanto translation of prepositions so used. Examples: "mi ridas je li" (I laugh at him), "mi enuas je la hejmo" (I am tired of home), "mi tuŝis lin je la ŝultro" (I touched him on the shoulder).

After adjectives, too, "je" is not uncommon: "plena je akvo" (full of water), "alta je tri futoj" (three feet high).

Do not, however, use "je" too often. It is a safe rule to avoid it whenever possible. Get the real meaning of the other prepositions, and you will not need to use it often.

De. "De" signifies "of," "from," and "by" (after passive verbs). Its primary meaning is separation: "estar dek mejloj de tie ĉi al tie" (it is ten miles from here to there).

"De" is also used generally for English "of." Bear in mind, however, that "pri" is the proper preposition to use, when "of" really signifies "about," "concerning": "mi parolis pri tio" (I spoke of that). Furthermore, the English "of" may be ambiguous: for instance, "the love of God." This must be translated in two different ways in Esperanto: "la amo al Dio" (the love which we bear towards God), "la amo de Dio" (the love from God, his love toward us).

Al. This preposition is frequently used in Esperanto in ways which seem somewhat peculiar to Americans. Upon examination, however, these are found to be perfectly logical. "Mi obeas al la patro, mi sekvas al li, mi petas al ŝi,"—all these are perfectly logical, and perfectly correct. One can also write, "Mi obeas la patron, mi sekvas lin, mi petas ŝin aŭ de ŝi." "Mi tuŝis lian ŝultron" is good Esperanto for "I touched him on the shoulder." So is "mi tuŝis al li sur la ŝultron."

Squash, quince, acre. "Squash" = kukurbo (gourd). "Quince" = cidomipomo or cidonio.

Practically all plants, trees, etc., are in Esperanto called after their Latin botanical names: for example, kverko (oak), acero (maple), laktuko (lettuce), brasiko (cabbage). The same thing can be said of the Esperanto names of animals, with the exception of "hundo" and "kato"; lupo (wolf), vulpo (fox), tigo (tiger), cervo (deer).

"Acre" has not yet found a place in the dictionaries. The international measure for land is the "hektaro," which is equal to about two and a half acres. Translate your "acres" into hektaroj, and think internationally. "Akro" would not be allowed; for "akra" means sharp.

Nominativo por klareco. The rule in Esperanto is that the Direct Object and all its qualifiers are put in the Accusative Case. There is, however, one exception to this, an exception which exists in order to prevent confusion. "La patro nomis sian filon Johano"—the father called his son John, gave him that name: "la patro nomis sian filon Johanon"—the father named, made mention of, his son John. "Mi trovis la vinon bonan"—I found the good wine: "mi trovis la vinon bona" (esti bona)—I found the wine good, that it was good.

This is really no exception, for the predicate adjective or noun never changes its case. In English we sometimes make no distinction, and we sometimes make a distinction by changing the order of the words.

Position of Adverbs and Prepositional Phrases. It is necessary in Esperanto, as in almost all other languages to pay attention to the position of adverbs and to prepositional phrases, to put these in such positions that there will be no chance of misunderstanding what

words they modify. For example, write either "li ekstreme deziras riĉiĝi" (he desires very much to get rich), or "li deziras riĉiĝi ekstreme" (he desires to get very rich). Which of the two forms is correct in a given case depends upon what you wish to say; but "li deziras ekstreme riĉiĝi" should not be used in either case, for it is ambiguous.

"Ĝi estas metita en la kesto de la knabo"—it was put into the boy's trunk. If you wish to say, "it was put into the trunk by the boy," change the position of "knabo" in the sentence: write it thus, "Ĝi estas metita de la knabo en la kesto."

Jaudon, jaude. "Jaŭdon" = on a Thursday; "jaŭde" = on Thursdays, being similar to "vespere" (at evening, on evenings), "nokte" (at night), etc. "I wish to go Thursday" is "mi deziras iri la proksiman aŭ venontan Ĵaŭdon." "I went Thursday" is "mi iris la lastan Ĵaŭdon."

Sampatrujanoj means "fellow-countrymen," literally "members (anoj) of the same (sam) fatherland (patrujo)."

"Palpi" = to feel about; "tuŝi" = to touch.

"Lerni" = to learn; "studi" = to study.

"Lernejestro" = schoolmaster, head of the place for learning.

"Studanto" = student.

A Word of Advice to Correspondents. If you do not know the meaning of an Esperanto word, look for it in the *Esperanto-English Dictionary* (Motteau). O'Connor's Text-Book and Bullen's Lessons are not dictionaries: they are merely exercise-books. You must expect to find many words which are not to be found in either of these beginner's lessons.

Small Boy (who has come five miles to the country store): "Please sell me a penn'orth of matches."

Storekeeper: "Here they are, my boy."

Two hours later the boy comes in again, with the matches in his hand.

"Please, mister, my mother says that these matches won't light."

The storekeeper remarks, "Nonsense," and lights one of the matches on his trousers.

While the shades of evening are falling and the stars commence to shine, the boy walks wearily into the shop.

"Please, my mother says she hasn't time to come here to light matches on your trousers," he says.

Knabeto (Kiu estas alveninta kvin milojn al la landa butik): "Bonvolu, vendi al mi alumetojn valorajn je unu penco."

Vendisto: "Jen estas ili, mia bubo."

Post du horoj la knabo eniras ree, kun la alumetoj en sia mano.

"Bonvolu, sinjoro, la patrino diras ke tiuj ĉi alumetoj ne povas esti bruligataj."

La vendisto rimarkis "Sensencaĵo!" kaj ekbruligas unu el la alumetoj sur nia pantalono.

Dum la ombroj vesperaj falas kaj le ŝteloj komencas brili, la knabo marŝas lace en la butikon.

"Bonvolu, la partino diras, ke si ne havas la tempon por veni tien ĉi por ekbruligi alumetojn sur via pantalono!" li diras.

International Reviews printed *only* in Esperanto

<i>Internacia Scienca Revuo</i> (International Scientific Review)	Price Sm 2,75 = \$1.40
8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.	
<i>La Revuo</i> —literary monthly—Dr. Zamenhof, Chief Collaborator.	\$1.40
Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, France.	
<i>Tra la Mondo</i> —illustrated monthly.	\$1.60
“Gazeto Tra la Mondo,” Meudon (S. et O.), France.	
<i>Lingvo Internacia</i> —twice a month—with 300 pages of literary supplement annually.	\$1.50
“Presa Esperantista Societo,” 33 rue Lacépède, Paris (V ^e), France.	
<i>Juna Esperantisto</i> (same address)	\$0.50
<i>Espero Pacifista</i> —International Peace Magazine	\$1.00
Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly sur Seine, France.	
<i>Espero Katolika</i> —Roman Catholic Monthly	\$1.00
Abbé Em. Peltier, Ste. Radegonde près Tours (L et L.), France.	
<i>Internacia Socia Revuo</i>	\$1.20
R. Louis, 45 rue de Saintonge, Paris, France.	
<i>Ekspori Ĵurnalo</i> —Commercial and Technical	\$1.00
C. Feyerabend, Gutleutstrasse 96, Frankfurt a. M., Germany.	
<i>Esperanto Ligilo</i> —printed in “relief” for the Blind.	\$0.75
Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris, France.	

Sample copies of the above mentioned Journals cost one-tenth the year's subscription. Send U. S. postage stamps for sample copies, and *U. S. Postal Orders* for subscriptions. Use the following form for subscriptions:—

Estimata sinjoro,

Mi deziras aboni la (journal) de la unua de
 (month). Mi sendas poŝtmandaton je \$ por la abono.

(Name)

(Address)

Esperanto: Auxiliary International Language

300 ORGANIZED SOCIETIES—20 JOURNALS

Supported and endorsed by many prominent men in Europe, Asia and America. London Chamber of Commerce holds regular Esperanto examinations.

For general information, for addresses of Esperanto magazines (British, French, German, Russian, Japanese, Polish, Swedish, etc.) and societies, for books, etc., write to the

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

BOULEVARD STATION, BOSTON, MASS., U. S. A.

Bullen's Lessons	\$0.26
Descriptive booklet, pamphlets, etc.10
Krestomatio (standard for style), paper	1.00
“ “ “ cloth	1.50

American Esperanto Journal, sample copy10

Send for price-list; all profits are spent for the advancement of the Esperanto “cause.”

Send two-cent postage stamp for catalogues of the British Esperanto Association and of the Librairie de l'Esperanto (Paris). These are much more complete than that of the American Esperanto Association.

“MI AUDAS VIN”

La unua kanto Esperanta eldonita en la U. Ŝ.:
muziko de Sro. Herbert Harris; poemo de Dro.
Leono Zamenhof. Facila por meza voĉo. —

PREZO: FR. 1.75 (35 CENTS); 5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

American Esperanto Association

Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A.

ESPERANTA PRESEJO

Mi petas konatigi al la samideanoj ke mi nun havas tipojn taŭgajn por
Esperanta presado.

Ĉiuj specoj de presaĵoj, aŭ Esperantaj aŭ Anglaj, libroj, libretoj, cir-
kuleroj, skribpaperoj, kovertoj, k. t. p., estos faritaj bene, rapide, kaj
je ne alta kosto.

Bonvolu skribi aŭ Angle aŭ Esperante al

ERNEST F. DOW, Presisto,

447 CRAFTS STREET - - WEST NEWTON, MASS., U. S. A.

IMPORTANT NOTICE

Wanted at once in every city and town, agents to sell the American
Esperanto Journal on 20% commission basis. For full particulars and
registration address:

BUSINESS MANAGER,

American Esperanto Journal,

Lock Box 8, Tenafly, N. J.